Lingvon en la sciencon", dum *David Kelso* el riĉa sperto de lerneja inspektoro detalis "kvaliton en edukado".

Zlatko Tišljar klarigis kaj klerigis pri "Kibernetika naturo de la homo" kaj *Endre Dudich* imagigis la eblan estontecon de "*Gaia* – nia planedo", dum belaj muzikaĵoj ilustris la temon de *Franz-Georg Rössler* per "*Ad infinitum* – senfineco en la muziko". Bazo por nia agado evidentiĝis "Varbi por Esperanto sub la aspekto de Teorio de la Menso" de *Horst Renemann*, kaj krom sia prelego *Wim De Smet* prezentis novan eldonon de "Normoj (kaj nomoj) de bestoj kaj plantoj" (2005), favorpreze.

Interkontinentan amplekson donis al la Konferenco *José Antonio Vergara* el Ĉilio (kun simila familio kiel la gastigantoj: bela edzino kaj du dancantaj filinoj). Ankaŭ lia temo rilatis al ISAE: "La ŝanĝiĝanta rilato inter scienco kaj socio: koncernoj por ISAE en la 21-a jarcento". Bildoj ilustris la prelegon de *Kuba Rybczíński* "La marĉa testudo *Emys orbicularis*" kaj same kolorigis lumbildoj de *Rüdiger Sachs* la fokusigon sur parazitaj vivocikloj inter antilopoj kaj sovaĝaj rabobestoj, dum *Hans Welling* perpleksigis la aŭskultantaron per sia teorio, ke la venko de la ĝermanoj kontraŭ romia fortosupereco en la fama *Varus*-batalo en la jaro 9 p.K. estis afero de (sub)pantalonoj.

Taŭga tempodivido ebligis ofte interesan opini-interŝanĝon pri la temoj. La programon bonege gvidis sinsekve d-roj *Rüdiger Sachs*, *Endre Dudich* kaj *Petro Chrdle*. Organizajn informojn donadis *Martina Sachs-Bockelmann* klarlingve. Kontribuis ankaŭ tiuj, kiuj deklaris sin "nevera sciencisto": *Jan Niemann* per lumbildoj pri Spicbergo, *Birthe Lapenna* per "Libereco en paco, paco en libereco" (prelego de ŝia edzo, kiun ŝi transskribis speciale por la ISAE-jubileo el sonbendmaterialo), *Petro Chrdle* per "profesia uzo de Esperanto", *Rob Moerbeek* per superrigardo de fruaj sciencaĵoj de Biblioteko *Hector Hodler* (1694-1906), kaj surprizis la nova ISAE-delegito por Ĉeĥio, la juna studento *Marek Blahuš*, kiu brile prezentis la junularan agadon Esperanto ĉe Interreto (E@I)."

Ĝis tie la raporto de nia nova honora membro. Mi volonte aldonas, ke la estraranoj kaj komitatanoj, kiuj ne partoprenis la ISAE-jubileon en Tavoleto, devas en tiu ĉi jaro serioze rekonsideri siajn aktivadon kaj engaĝiĝon kadre de nia Asocio kaj estonte pli efike kunlabori – aŭ rezigni pri gvida funkcio kaj disponigi siajn postenojn al pli aktivaj ISAE-anoj por pli reale subteni la estraron kaj komitaton.

Prof. d-ro Rüdiger Sachs, prezidanto de ISAE



La plej fruaj scienclibroj en Biblioteko *Hector Hodler*

Rob MOERBEEK

El antaŭ Esperanto la Roterdama biblioteko prezentas dekojn da verkoj interlingvistike interesaj. Nia plej frua libro transmigris al Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kie ĝi ricevis fortikan bindon, tiel ke eblis fotokopii nur 23 paĝojn. Sed ili enhavas multon: Temas pri la dua eldono de "*Mercury or the Secret and Swift Messenger, Shewing How a Man may with Privacy and Speed Communicate his Thoughts to a Friend at any Distance*" – t.e. "Merkurio aŭ la sekreta kaj rapida mesaĝisto, montranta kiel kun privateco kaj rapido oni povas komuniki siajn pensojn al amiko en ajna distanco". Ĝin verkis lia Episkopa Moŝto *John Wilkins*, ekslordo-episkopo de *Chester*. Publikigita en 1694 en Londono.

Ĝi apartenas al liaj t.n. "Matematikaj" verkoj en tri traktaĵoj:

a) Malkovro de Nova Mondo
b) Matematika Magio kaj
c) Merkurio …, nia temo.

Tiu nova loĝebla mondo probable troviĝas en (!) la luno, eĉ estas probable ke la homoj povos iam atingi tiun mondon (!). Sed *Wilkins* anoncas ankaŭ malkovron de nova planedo, "konkludiganta ke probable Tero estas unu el la Planedoj".

"Matematika magio" alivorte temas pri mirakloj fareblaj per "meĥanika geometrio, t.e. rilatas meĥanikajn povojn kaj movojn". Tiu temo, "pri unu el la plej facilaj, plezuraj kaj utilaj – tamen plej neglektataj – partoj de matematiko, neniam antaŭe estis pritraktita ĉilingve" (do anglalingve). Ni povas demandi nin, el kiu lingvo li do ĉerpis…

Ekprezentante sian sekretan komunikmetodon, *Wilkins* aludas iun "*Nuntius inanimatus*", kio pensigas pri nehoma inspiranto, eble anĝelo. Li ja distingas inter la rekta komunikado de la anĝeloj "per sia tuta substanco" kaj la malperfekta homo kiu devas uzi aparte la orelojn por lerni (sciigi) kaj la buŝon por instrui (informi).

Lingvo liaopinie ne estas natura doto, sed lernaĵo, samkiel arto.

Grekaj terminoj en latina vesto liveras "*Cryptomenysis*", t.e. la arto de sekreta informado; parole ĝi estas "kriptologio", skribe "kriptografio" kaj signe aŭ geste "semajologio" (komparu "semiologio" en PIV).

En la kriptologio estas sekretaj aŭ la temo aŭ la vortoj: la temon oni sekretigas uzante metaforon aŭ tutan alegorion.

Sed, kiel dirite, la ceteran enhavon ni devas legi en Vieno.

Ankaŭ la dua libro deksepajarcenta estas nur fotokopio, tamen de la fama "*Via Lucis*" de Komenio (1668). La plena titolo legiĝas "*Via lucis vestigata et vestiganda, h.e. (hoc est) rationabilis disquisitio, quibus modis intellectualis animorum lux, sapientia, per omnes omnium hominum mentes et gentes, jam tandem sub mundi vesperam feliciter spargi possit*". Do: La vojo de la lumo esplorita kaj esplorenda, t.e. racia diskuto, en kiuj manieroj la intelekta lumo, la saĝeco (klereco), povos nun fine sukcese disvastiĝi tra ĉiuj mensoj kaj gentoj de ĉiuj homoj en Okcidento.

La libro estis verkita jam 26 jarojn antaŭe, do en 1640, en Anglio, sed nur en 1668 povis aperi en Amsterdamo.

Noto klarigas, ke restis nur po unu ekzemplero en Prago kaj Oksfordo; la Hamburga pereis en la dua mondmilito. Nia fotokopio ekas ĉe la 15a ĉapitro: Kvar premisoj por universala klereco estas: universalaj libroj, lernejoj, kolegio kaj lingvo. La 19a ĉapitro detalas la sistemon de la universala lingvo: preferinde estas krei novan lingvon ol latino, kiu estas kompare pli nekonata, pli malfacila por la t.n. "barbaraj" (do: alikulturaj) gentoj, kaj postulas jarojn da intensa studado pro la fleksiaj formoj (deklinacio kaj konjugacio), sintaksaj konstruoj kaj multege da anomalioj (esceptoj) en ĉio ĉi. Sed ankaŭ la itala, kvankam konata de preskaŭ ĉiuj eŭropaj gentoj kaj krome de araboj, turkoj, tataroj kaj aliaj barbaroj, estas tro neregula.

La universala lingvo devas esti la plej riĉa el ĉiuj, por ekzakte esprimi ĉiujn realaĵojn (aŭ aferojn), facile prezenti ĉiujn mensajn konceptojn, entute bezon-kovra. Tia eksplicite ne estas latino: nek laŭ

kunmetado nek laŭ derivado ĝi estas "fruktodona", male ĝi pruntadas esprimojn el la greka. Sed plej grave: la universala lingvo devas esti "ĝenerala antidoto" kontraŭ konfuzo de konceptoj. Konstruantoj de Babela turo ne sufiĉe interkompreniĝas: ni esprimas vortojn, ne aferojn (*verba loquimur, non res*). Li do pledas por "reala lingvo" (*sermo realis*), kiu estu racia (sen miskomprenoj), analogia (sen esceptoj: konsekvenca) kaj harmonia (ne devianta de la realaĵoj). Per tia lingvo decus prezenti la saĝecon de Dio. Laŭ biblia teksto ĉiuj popoloj kunvenu por glori Dion. (Jes. 66:18). (kio pensigas pri universala kongreso por komuna idealo Zamenhofa.)

Multaj el la verkoj antaŭ 1887 serĉas la originon de la lingvo. El 1784 en germana traduko de *E.A.Schmid* ni trovas la verkon de Lordo Monboddo "Pri la origino kaj la progresoj de la lingvo". La skota lordo kuraĝe kritikis la filozofion de *Locke* kaj spitis la famon de *Newton*. "Kvankam la britoj malfavore akceptis lian greke-klaran kontraŭadon al ĉio falsbrila, ni germanoj estas pli objektivaj", argumentas la tradukinto. Jam *Leibniz* oponis al *Locke*. Kontraŭ *Newton* Monboddo citas verkon "Antikva metafiziko aŭ la scienco pri universalaĵo" (*Edinburgh*, 1779).

Ankaŭ en siaj ideoj pri literaturo Monboddo akordiĝas kun germanoj, pledante por "greka simpleco", kia ĝi montriĝas en la frazkonstruo (t.n. "periodoj") de Diogeno el Halikarnaso. Unu el la ekzemploj rilatas al ideoj perfektaj kaj neperfektaj: la perfektaj estas abstraktaj (sen akcidencoj, laŭokazaj ecoj). Ĉar ili estas nekunmetitaj bazoj de la aĵoj (konkretaj fenomenoj), ni nur malfacile povas ilin koncepti. Ili sin montras sub ĉiaj formoj kaj substancoj, t.e. kunligitaj, enkorpigitaj, tiel ke estas tre malfacile ilin disvolvi ("elŝeligi") kaj montri izolitaj. Kiel jam diris Aristotelo: "Ju pli grandaj (vastaj, ĝeneralaj) estas tiuj bazoj je forto kaj influo, des malpli facile estas kapti ilin klaraj."

El 1831 datiĝas "*Genigrafia Italiana*" de *P. Mitraja* el *Lucca*, ofertanta novan metodon skribi tiun lingvon. En la enkonduko legiĝas, ke ĉiuj (!) okcidentaj lingvoj instinkte ("nature") dividas sian lingvan materialon en dek parolelementojn. Interese, dirus skeptikuloj, ke li ĝeneraligas: sed nia kleriko ja "skrupule esploris ĉiujn parolatajn idiomojn"! El la 16 reguloj de sia simpla gramatiko *Zamenhof* uzas la unuan duonon por ĉiuj ĉi parolelementoj, krom konjukcioj kaj interjekcioj; sed li aldonas prononcregulon, neduobligon de neado, ele-

mentsinsekvon, formadon kaj pruntadon de vortoj kaj eĉ poezian formon.

Nia akademiestro *Geraldo Mattos* certe ĝojos legante ke "participoj" havas memstaran lokon apud "verboj".

Mitraja opinias necesa defendi la artikolon, kiu mankas en latino, sed ja troviĝas "en ĉiuj ĉi lingvoj".

"Kompleta kurso de Universala Lingvo" franclingve titoliĝas unu el la plej ambiciaj projektoj (1852): per ĝi *C.-L.-A. Letellier* volas samtempe prezenti facilan kaj fidindan metodon por lerni la (!) lingvojn kaj kelkvorte kompari ĉiujn literaturojn mortajn kaj vivantajn. Nia honorlegia kavaliro jam ĉ. 1830 ekideis pri universala lingvo. En la unua parto "Gramatiko" li prezentas la "ĝeneralan ideon de ĉi tiu malkovro" plus aplikojn por 12 lingvoj: la germana (kiel unua!), angla, hispana, franca mem, la greka, sed ankaŭ la hebrea; tiam la itala, Latino (!), la rusa, sed ankaŭ la turka, persa kaj araba. Fine ni povas ĝui novan procedon por studi la mortajn kaj vivantajn lingvojn sen lacigi la memoron kaj sen farado de tradukekzercoj.

Cetere li dediĉas sian verkon al la suverenoj de ĉiuj landoj. (Tamen la du volumoj ampleksas 895 paĝojn…)

Antaŭajn filologojn jam frapis, ke la modernaj lingvoj konservis profundajn rilatojn (similaĵojn) kun la hebrea. Sed dum ilin absorbis tradukplezuro, literaturado aŭ studo de nur limigita lingvoparencaro, nia aŭtoro plu studadis la ĝeneralajn rilatojn, esperante trovi praktikan utilon por la ĉiutagaj bezonoj. Jen kelkaj el liaj principoj kiuj povus interesi esperantistojn:

Pri la utileco de universala lingvo: neniu el la mortaj lingvoj povas servi kiel universala lingvo, sed ankaŭ neniu el la vivantaj. Nome kio okazus se ĉiuj lingvoj pretendus tian rolon! Kaj… nenia lingvo inventita laŭ la modelo de tiuj lingvoj povas servi por konsistigi universalan lingvon.

La kondiĉoj plenumotaj de universala lingvo ampleksas: klarecon, metodikecon, riĉecon pli ol en ĉiuj lingvoj, kaj tiel facilan asimileblon, ke ĝi en kelkaj semajnoj engravuriĝas en nia memoro kun senegala facileco. Krome ĝi ebligu ĉiumomente studi sian propran (nacian) lingvon, ĝi favoru rigoran rezonadon, progresigu la sciencojn, literaturojn kaj lingvojn, inkluzive de la nomenklaturoj (terminaroj), kiuj nun nur balastas la memoron. Sen ĉi tiuj (kaj aliaj) kondiĉoj la projekto nur bremsus la (homaran) progreson.

Lasante ĉian teoriumadon al aliaj filologoj, *Letellier* eliras de la dek parolelementoj (kiel i.a. *Mitraja*), "unu el la plej firmaj bazoj de la filologia studo".

Enkonduke li traktas la "analizan lingvon" kiel universalan lingvon. Tiucele li analizas vortojn (*analyses radicales*) kaj due la frazojn (*analyses grammaticales*). Lia sistemo distingas substantivon per komenca vokalo: "ido" = plezuro. Ĉe la adjektivoj komenca *"b"* donas kvalitan rolon: "*baqu*" = malforta, kaj komenca *"p"* donas determinan rolon: *"pa"* = mia. Komenca "g" prezentas verbon: "*guga*" = skribi, sed denove la participojn aparte indikas *"c"*: "*cuga*" = skribanta. Simile pri pronomoj (d-), prepozicioj (t-), konjunkcioj (v-), interjekcioj (f-); adverboj tamen iom simile kiel en Esperanto: aparte la nederivitaj (j-) kaj la derivitaj (h-). Tiel li povas priskribi ankaŭ hebrajn vortojn.

Ni trovas krome ian kunmetadon: patro estas *"eg"*, avo *"egeg"*, avino *"egec"*. Sed kiel indikite, la sistemo postulas iom da persisto: La gramatiko katenus nin tra XLVIII + 372 paĝoj kaj la Radikaro tra IX + 466 paĝoj. Entute do preskaŭ 900 paĝoj da "senpena studado".

El la lasta jaro de la 18a jarcento ni trovas "Provon" (Eseon?) de *J.S.Vater*, germanlingve "*Pasigraphie und Antipasigraphie*": Pazigrafio kaj antipazigrafio, aŭ pri la plej nova eltrovo de ĝenerala skriblingvo por ĉiuj popoloj – kaj pri la pazigrafiaj ideoj de *Wilkins* (evidente aŭtoritato kun sia "*Mercury…*"), *Leibniz, Wolke* kaj *Kalmár*. *Vater* mencias la grandan spiritan progreson de la lastaj jardekoj: ĉiu jaro fariĝas grava por la sciencoj. Sed li atentas ankaŭ la rolon de la politikaj ŝanĝoj survoje al la 19a jarcento.

La pazigrafio enhavas bazajn sciojn de la nova Arto-scienco, nome ĉion tiel skribi kaj presi ke ĝi estas legebla kaj komprenebla en ĉiu alia lingvo. La libro havis francan originalon (1797), sed prese aperis nur en la "Mikaela foiro" de 1798. Kupra plato ebligas presi la 12 bazajn signojn. Ĉiuj nocioj tamen dividiĝas en 3 subrubrikoj: la unua servas por kunligi/kompletigi la ceterajn parolelementojn. La du ceteraj temas pri substantivaj kaj adjektivaj konceptoj, propraj nomoj, parto-indikoj, objektoj kun ĉiuj iliaj kvalitoj, situacioj kaj agoj. Li precizigas ke tiu dua grupo ampleksas objektojn, agojn, ideojn aŭ emojn, ĉiutage observeblajn en familio, societo, kontaktoj inter amikoj kaj parencoj: do temas pri amo, sed ankaŭ aferoj: komerco kaj banko. ("Amikon karesu, sed kalkuli ne forgesu", laŭ Zamenhofa proverbo.)

La tria servas kiel kompletigo de la dua grupo: prezentiĝas artoj, sciencoj, moralo kaj religio, fine politiko, ĉiuj rigardataj kiel sciencoj. (Kio memorigas nin pri la Marksa superstrukturo.)

Sub tio la vortoj estas ordigitaj ĉe la nocioj laŭ difinita sistemo.

Kaj en ĉiu ĉefrubriko *Vater* prezentas po 12 apartigitajn ĉefkonceptojn. Siavice tiuj ĉi subdividiĝas en po ses pliajn partojn, do entute 3 x 12 x 6 = 216 partoj.

La 12 ĉefrubrikoj komenciĝas per:

1) Dio, materio, nombroj, elementoj, stato kaj pozicio. Cetere troviĝas kun detaloj:
2) Kreskaĵoj, sed ankaŭ oleo kaj gumo,
3) Bestoj, sed ankaŭ monstroj,
4) La fizika homo,
5) La sentema kaj inteligenta homo,
6) La socia … religia homo,
7) Metiistoj, komerco …
8) Senprofitaj artoj,
9) Sciencoj … kaj banko,
10) Tempoj, mezuroj, trafiko,
11) Leĝoj, sociaj aferoj, moneroj kaj fine
12) Lokoj.

Tiaj lingvoprovoj nomiĝas (malgraŭ la ofta atento al la "praktika vivo") "filozofiaj" kaj ili plu aperadas ankaŭ en la 19a jarcento.

Sed tiam ni ektrovas ankaŭ Volapukaĵojn.

En 1889 *Maria Tommasi* enmondigis pli ol milpaĝan A-6-formatan "*Vocabolario Italiano-Volapük e Volapük-Italiano*". Kun ok vokaloj a e i o u ä ö ü kaj 19 konsonantoj la mondolingvo de *Schleyer* havas unu literon malpli ol Esperanto. Mirigas la prononco de "j" kiel itala *sce, sci,* do [ŝ] kaj de *sh* kiel "j" en "*jeune*", do [ĵ].

Frazetojn en tiu lingvo ni trovas ĉe la antverpena instruisto *Arthur Renier* en "Principoj de Volapük", ĝuste el "nia" jaro 1887: li sekvas la lastajn korektojn faritajn de la fama ruso *A. Kerckhoffs*:

Glidi söl! – Saluton, sinjoro! (angle "*Sir*", kun l anstataŭ r).

Liko stadol? – Kiel vi fartas? (kelkaj anglaj esperantistoj pro nacilingva interfero diras "Kiel vi statas?")

Statob benüno. – Mi fartas tre bone.

Germanan-anglan kombinon ellaboris *Elias Molee* en la sekva jaro 1888: *Plea for an American language*. Li plendas ke la nuna angla montriĝas nacia "misfortuno" kaj pledas por sistema literumado, oni faru vortojn puraj, "mem-klarigaj" laŭ modeloj grekaj (ni memoru Monboddon!), germanaj kaj … irlandaj. Enestas gramatiko, legaĵoj kaj vortklarigoj. Li presigas la grekan literon *zeta*.

Samjare *Hugo Schuchhardt* provas iom pliriĉigi Volapukon je vokaloj en "*Auf Anlass des Volapüks*" (koncerne Volapukon). Li defendas ĝin kontraŭ troa kritiko de ekz. *Ferdinand Scheyrer* ("*Pasilingua*", 1888) kaj kontraŭ konkurencaj metodoj de *Bamberg*, "*Kosmos*" k.a. Tiel li proponas por "mi" *-i* anst. *–ob*, por "vi" *-e* anst. *-ol* kaj por "li" *-a* anst. *–om*; krome *–l* por la posesivo: tiel *obik* fariĝus *il* (mia).

Defende al Volapuko li argumentas interalie per la kvanto da aperantaj gazetoj tiulingvaj: jam 20!

Male, tute ridindigas la aferon *D-ro Römer*. En la samjara "Volapuko kaj germanaj profesoroj – Polemika arabesko" li citas el "Dresdenaj Informoj", n-ro 323, kie *D-ro Koppel* el *Ellfeld* ŝercrubrike prezentas drinkejtablan babilon: Iu patro jam scias kion donaci al siaj infanoj okaze de Kristnasko: ion praktikan, 8-lecionan kurson, alivorte "La arto lerni Volapukon en 8 tagoj".

Sian drinkkamaradon li klerigas pri la aŭtoro *Schleyer*: tiu firme instalis sin surpantalone, enkapigis ĉiujn ekzistantajn lingvojn, elektis ĉion kio plej facile enkapiĝis al li kaj el tio li kunflikis lingvon kiun li nomas "*Volapük*" kaj pri kiu li senreklame povas aserti ke ĝi estas la plej facila kaj komprenebla el ĉiuj lingvoj. La alia reagas per sobra demando: "Kaj ĉu la viro cetere estas sana?" Konkrete *Römer* oponas, ke ekz. araboj konas nur tri vokalojn: kiel ili lernu la ok volapukajn?

Sed ne nur lingvaĵojn enhavas la antaŭaj jarcentoj. Jam frue en la 20a aperis "Por niaj filoj, kiam ili fariĝis 18-jaraj." Neniel moralpredikante, laŭ pure medicinista sperto ĝi avertas kontraŭ seksmalsanoj, kun la rimedoj aplikataj por kuraco de ekz. sifiliso, eĉ se ne ĉiam sukcese.

Jam en 1903 "*Journal l'Emulation*" publicis artikolon de *S. Poljanski* en francigo de la ĉefredaktoro de "Belga Sonorilo", *Jos. Jamin*: "*Un curieux Cadran Solaire*". La dua eldono de la originalo, "Skizo kaj tabeloj por konstruo de kurioza sunhorloĝo inter polusoj kaj ekvatoro" troviĝas en "Lingvo Internacia"de 1904.

Dulingvaj artikoloj jam dekomence helpis novulojn: "*Sondeur à drague* / Sondilo skrapanta" (1904) de *M. Léger* legiĝas en *Bulletin du Musée Océanographique de Monaco*. Temas pri helpilo ĉe submarfunda arkeologio.

La iniciatinto de nia revuo "Esperanto" *Paul Berthelot* en 1904 lanĉis "Provon de Ĥemia Nomigado en Esperanto". Li uzas sensupersignan "ortografikon". Kontraŭante "tro apriorajn" modernigojn en tiu fako, li adoptas la simplan tradician sistemon. Tamen li sekvas la proponon de *Th. Renard* uzi –id anst. –ur en duopaj kombinoj. Plian komplikaĵon alportis samtema artikolo de tiu *Renard* kaj *R. van Melckebeken* en "Internacia Scienca Revuo", aperinta dum la presado de la "Provo" de *Berthelot*. Li povis ankoraŭ enŝovi noton, ke ties sistemo ne tre diferencas de la lia, kaj ke li eĉ pruntis de ĝi kelkajn detalojn. "Kiel akiritajn de l' leganto" li konsideras la "konerojn de atomeco, elektra ioneco, k.c. de la ŝtofoj." Zorge li evitas "–io" ĉe metaloidoj, rezervante ĝin por la metaloj, escepte de la konataj plumbo, fero, kupro kaj oro. Pri tiuj jonoj oni depresis apartan broŝuron el artikolo de "Scienca Gazeto": En "Pri la teorio de l'Jonoj" *Helte* (1904) klarigas la fenomenon per komparo kun osmozo.

Kaj ankoraŭ pli frua broŝuro "Pri la slavoj" donas historian superrigardon pri ties disvastiĝo en Eŭropo, kun interesaj citoj el antikvaj aŭtoroj. (*P.Mikulov*, trad. *V. Laskin*, 1898). Ni povas nur miri kiel bone en tiel frua stadio oni jam uzis la internacian lingvon, eĉ antaŭ la apero de kelkaj modelaj sciencaj tekstoj en "Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto" (1903), redaktita de nia karmemora *D-ro L.L.Zamenhof*.

Ni tenu la nivelon de nia scienca literaturo samalte!

Adreso de la aŭtoro

Rob MOERBEEK
Zwaansmeerstraat 48
NL – 1946 AE Beverwijk / NEDERLANDO

<r.moerbeek@wanadoo.nl>

Priaŭtora informo

La aŭtoro (*Haarlem*, 1936) ses jarojn instruis la grekan kaj Latinon, estis oficisto en la CO de UEA (1969-2001), privatdocento pri Esperanto (1978-1998, Amsterdamo). Nun volontulas ĉe UEA (biblioteko, provlegado). Plu instruas kaj korektas tekstojn. Honora membro de ISAE.

Subteno al eldonado de sciencaj eldonoj: sperto de litoviaj universitatoj

Dainora GRUNDEY

Vilniaus Universitato Kaunas Humanisma Fakultato (VU KHF)

Enkonduko

Eldonado estas specifa kampo de komerco. Ĝi entenas tiajn aspektojn kiel produktado de varo, oferto de komplezoj kaj funkcio de klerigado. Tamen la precipa celo de eldonado – same kiel de aliaj kampojn de komerco – estas ricevi profiton. La produktoj de la eldonisto – t.e. la diversaj eldonaĵoj – devas elteni konkurencon de aliaj alternativaj eldonaĵoj, el kiuj la aĉetanto povas elekti. Por la aĉetanto tute aŭ preskaŭ ne gravas, kiu eldonanto kontentigos liajn inform-bezonojn: por ke la eldonaĵo vere estu utila, ĝi devas konformi al veraj bezonoj kaj interesoj de la legantoj. Do, unue la eldonistoj devas koni la aĉetantojn de siaj eldonaĵoj. La bezonoj de ebla eldonaĵ-aĉetanto estu orientanta en la agado de ĉiu eldonisto. Por sukcesa agado tamen ne sufiĉas nur koni la aĉetanton. Ke eldonaĵojn oni sukcesu disvendi kaj la eldonado mem ne estu malprofita, necesas bone pripensi planojn de subvenciado.

Kvankam la precipa rimedo de **subteno** de sciencaj eldonaĵoj estas reklamo, la plej grandan efikon donos la kunordigado de ĉiuj elementoj de **kompleksa subteno**: reklamo, persona disvendo, popularigo kaj stimulo de la disvendo. La signifo de la lasta en pasintaj jaroj multe kreskis. Do, analizante la subvencion de eldonado kiel starpunkton oni devas elekti ĝuste la **stimulon de vendado**.

Tamen ĉiuj streboj disvendi la varon kaj ricevi profiton ne devus limiĝi per iu kutima sfemo. La strukturo kaj ĉiuj decidoj pri kompleksa subteno de eldonado devus esti konstante trarigardataj, rimarkataj novaj tendencoj, kaj oni devus strebi konscii (kaj kiel eble aktive refari) neefikajn manierojn de disvastigado kaj agojn de subtenado.